Dr. Sós. Wien I., Tuchlauben 18.

BOHEMA ESPERANTISTO

ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření esperanta a esperantismu mezi Čechy

Orgán „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ v Rakousku.

Zodpovědný redaktor: H. K. BOUŠKA, Praha-Smíchov 730.

Vydavatel a nakladatel: J. IGLAUER, Praha III., Hroznova 6.

Celoroční předplatné 4 K

pro členy spolků sdružených ve »Svazu čes. esp.« 3 K, jednotlivá čísla 36 h.

Ročník V. — Sešit 3.

Praha, 20. XII. 1910. Cena 36 h

ČESKÝ ESPERANTISTA Redakce a administrace: **Praha III., Kampa 495, Čechy.** Roční předplatné 4 K. – První česko-esperantská revue přinášející české informační články a zprávy o jazyce mezinárodním a hnutí esperantistickém, esperantské zábavné i poučné, původní i přeložené články o nejvýznačnějších otázkách a událostech kulturních, zvláště mezinárodních, vychází za redakce H. K. Boušky (Praha-Smíchov 1097) a za spolupracovnictví četných čelných esperantistů domácích i cizích, pravidelně 25. dne každého měsíce (12 kráte za rok) v sešitech nejméně o 16. str. Revue jest orgánem »Svazu čes. esp.« (Bohema ASOCIO esperantista, Praha II., Hybernská 1036/XIV), jehož členové dostávají ji **zdarma**, zaplatí-li roční přísp. 5 K, nečlenové za roční předpl. 4 K (pro členy spolků sdruž. ve Svazu je předpl. 3 K.).

BOHEMA ESPERANTISTO Redakcio & administracio: **Praha III., Kampa 495. Bohemujo-Aŭstrio.** Jara abonprezo 1·70 Sm. — La unua monata bohemesperanta revuo por propagando de esperantismo inter Bohemoj, oficiala organo de »BOHEMA ASOCIO ESPERANTISTA« (Svaz českých esperantistů, Praha II., Hybernská 1036/XIV., Bohemujo-Aŭstrio) eliras sub la redaktado de H. K. Bouška (Praha-Smíchov 1097, Bohemujo-Aŭstrio) kaj kun kunlaborado de multaj eminentaj esperantistoj bohemaj kaj fremdaj regule la 25-an tagon de ĉiu monato (12-foje dum la jaro) en kajeroj almenaŭ 16-paĝaj enhavante krom bohemaj informaj artikoloj multajn esperantajn originalajn kaj tradukitaj [illegible]ajn kaj klerigajn artikolojn kaj notizojn pri temoj aktualaj kaj in[illegible].

Publikace „Svazu čes. esp.“,

které má míti každý esperantista:

Úvahy o jazyce mezinárodním. Napsal Unuel (dr. Zamenhof). Za 50 hal., pro členy za 44 hal.

Jazyk všeslovanský a esperanto. Napsal Jos. Krumpholc. Za 23 hal., pro členy za 20 hal.

Esperanto mezi Čechy. Napsal H. K. Bouška. Za 2 hal.

Skupina ze schůzky moravských esperantistů na pohlednici za 10 hal. (od 20 kusů po 6 hal.).

Objednávky vyřizuje generální sekretář p. Mil. Schmidt, Praha II., Hybernská 1036.

Zásilky pro „Svaz čes. esp.“ adresujte: Mil. Schmidt, Praha-II. 1036/XIV.

P. T. dopisovatele „Č. e.", důvěrníky „S. č. e.", sekretáře spolků a kroužků (sdružených i nesdružených ve »S. č. e.«) a vůbec všechny své přátele prosíme snažně, aby nám přesně sdělili (na kor. lístku!), kdy (den i hodinu) a kde (místo i místnost) scházejí se *pravidelně* místní esperantisté; připomenuto vždy budiž, jedná-li se o schůzku spolku, kroužku, volné (stolní) společnosti neb pod. Došlé údaje budeme otiskovati pod názvem »Pravidelné schůzky čes. esp.« (viz »Zprávy spolkové«), aby každý český esperantista věděl, navštíví-li některé místo, kde a kdy může najíti místní esperantisty pohromadě. Myslíme, že každá společnost ráda vidí návštěvníky esperantisty (jako mnohý rád vyhledává společnost esp. v místě, do něhož přijde) i doufáme proto, že nám nikdo žádaných informací neodepře.

Pp. předplatitelům. Číslem tímto končíme první čtvrtletí. Proto žádáme pp. předplatitele, kteří ještě nezaplatili, aby laskavě předplatné, které obnáší zajisté jen nepatrný obnos, nám zaslali co nejdříve.

Pp. členové Svazu, kteří doposud členský příspěvek za rok 1910 až 1911 nezapravili, upozorňují se na to, že od nového správního roku uplynulo již **sedm** měsíců! Ježto nepořádné placení příspěvků jest značně veškerému podnikání a činnosti svazové na újmu, žádáme důtklivě své pp. členy pokud své povinnosti nevyhověli, aby tak neodkladně učinili.

Nestěžujte nám zbytečně upomínáním práci, kterou můžeme jinak ve prospěch svazu využíti.

Kalendář Svazu dělnických tělocvičných jednot československých na r. 1911 obsahuje řadu pěkných a vážných článků poučných, z nichž jako všeobecně zajímavé uvádíme: Jak se máme vzdělávati? (Chaloupecký), Ženská otázka (Sýkora), Tělocvik švédský (Silaba). Vkusný tento kapesní kalendář stojí pouze 70 hal. (váz.).

Propagační fond „Svazu čes. esp." má umožniti dobrovolnými dary přátel esperanta — jelikož dosavadní příspěvky členské na to nestačí — pronikavější propagaci esp. na venkově i propagaci tiskem, která byla dosud umožňována — v omezené míře — jen obětavostí jednotlivců, kteří sami výlohy hradili, což pochopitelně několik jednotlivců trvale činiti nemůže, obzvláště když věci věnují kromě toho značnou námahu i spoustu času. Proto »Svaz čes. esp.« doufá, že každý přítel esperanta (zvláště spolky sdružené ve Svazu) přispěje dle své možnosti na tento účel a bude při každé příležitosti pamatovati na tento fond. Zejména by měli přispívání na propagační fond pokládati za svou povinnost ti, kdož jinak nemohou pro esperanto pracovati. Každý sebe menší příspěvek je přijímán s díkem a veřejně kvitován ve zprávách spolkových v »Čes. esp.«.

Zájmy všelidské (čas. propagující organisaci všeho lidstva) změnily redakci (Smíchov 1097) a snížily předplatné (3 K). Vyšlo již 1. a 2. čís. III. ročníku.

Esperantská korrespondence — Esperanta korespondado.

Jednonásobné otištění oznámení stojí 60 h., trojnásobné K 1·50. Členové svazu a spolků sdružených platí pouze 40 hal., resp. 1 K. Pro přímé předplatitele je prvé otištění zdarma. — Vyměňovati dopisy1), pohlednice2), pošt. známky3), přejí si:

La unufoja enpreso de l' anonco kostas 25 sd. trifoja 63 sd. La anoj de l' asocio kaj aliĝintaj societoj pagas sole 17 sd, resp. 42 sd. Por la abonintoj la unua enpreso estas senpaga.—Interŝanĝon de leteroj1), ill. poŝtkartoj2), poŝtmarkoj3) deziras:

115. F-ino Ludmila Vyškovská, Vyškov, Moravio-Aŭstrio1)2). — 116. S-ro Charles Andersen Dr., Louisgade 28, Thisted, Danujo2). — 117. S-ro J. Ferrer Str. Muntaner 111-4-2, Barcelona, Hispanujo.2) — 118. S-ro Carlos Jorge, Faria é Castro Seminario, Funchal, Madeira Insulo3). — 119. S-ro Max Deutschmann, Frankfurt á Main, Franken Allee 151, Germanujo3). — 120. Presidanto de Plevena esper. grupo petas nebulgaraj kursestroj elsendi al li la nomaro de tiuj kursanoj, kiuj deziras korespondadi kun kursanoj en Pleven Bulgarujo. — 121. F-ino Radka Kozarova, gimn. st. de VII. Klaso Pleven, Bulgarujo2). — 122. S-ro Marko I. Koprivica, komercisto, Čemerno Avtovac, Hercegovino1)2). — 123. S-ro Petro Babič, G. N. O. Auckland, New Zealand1)2). — 124. S-ro Duro Vojkovič, apotekisto Klanjec. Zagorje, Kroatujo.

SPOR O METHODU VÝVOJE MEZINÁRODNÍHO JAZYKA.

Napsal *dr. Stan Kamaryt.*

Myšlenka mezinárodní řeči je na postupu. Přesvědčení, že mezinárodní řečí může státi se toliko řeč umělá, stává se každým okamžikem všeobecnějším. Šest skvělých mezinárodních kongresů esperanta dokumentovalo možnost praktického užívání esperanta tak dokonale, že o ní už skoro nikdo nepochybuje. Stařičký autor volapüku může se zadostiučiněním pozorovati úspěch snu, který on po prvé začal realisovati v praxi. On, kmet osmdesátiletý, vidí, že ne nadarmo podnikl svůj velkolepý sociologický pokus, pokus o jehož odvaze a ohromnosti neměl ze současníků nikdo ani tušení. Není to sice jeho systém řeči, který se rozšířil, ale jeho je zásluha, že sestrojil systém, který prvý osvědčil se v praxi. Neméně spokojen může býti ovšem i Zamenhof, autor esperanta, které krátce po zániku volapüku se rozšířilo po celém světě a jehož dnes se užívá k mezinárodním stykům v nejrozmanitějších oborech lidské práce měrou poměrně velmi velikou. Sen polyhistorů 17. století se splňuje. Máme z toho srdečnou radost i my, kteří jako prostí vojáci dali jsme se do služeb veliké myšlenky a vidíme, že nebojovali jsme nadarmo, že malilinký krůček, o nějž jsme myšlenku řeči mezinárodní popovedli ku předu, byl skutečným krokem lidstva vpřed.

Boj o zavedení mezinárodní řeči není však ještě skončen. Běží o to, jakým způsobem bude mezinárodní řeč zavedena a jaký bude konečný její útvar. Nemůže býti sporu o tom, že řečí mezinárodní bude esperanto, hlavně pro svou schopnost vývoje. Od roku 1887, kdy bylo po prvé publikováno jako projekt umělé řeči, rozvinulo se do dneška v řeč velikého bohatství slovníkového, veliké snadnosti i ohebnosti gramatické, i veliké přesnosti reprodukční. Ze slovníku tisíce základních kmenů odvozena dle pravidel derivačních vedle řady slovníků esperantsko-národních už i řada odborných slovníků technických, jako *Ch. Veraxa* »*Vocabulaire technique et technologique français-espéranto*«, a téhož autora »*Enciklopedia vortareto esperanta*«, *Kabeův* malý konversační lexikon »*Vortaro de*

esperanto« a *E. Boiracův: »Plena vortaro esperanto-esperanta kaj esperanto-franca«.* Též sestavování technických slovníků, které už po tři léta provádí vědecká kancelář esp. (scienca oficejo) v Ženevě, pokročilo velmi značně. Pravidla gramatiky i slovníku esp. bylo v těchto pracích třeba aplikovati na nejrozmanitější úkoly. Tím, rozumí se, objevily se a vynikly všechny jejich dobré i slabé stránky.

Pro odvozování a tvoření slov v esperantu platí dvě zásady: mezinárodnost a logika. Dle prvé zásady přijímají se do slovníku esp. všechna slova mezinárodní, která označují v kulturních řečech týž pojem tak, že píší se foneticky a dostanou příslušnou mluvnickou koncovku. Dle druhé zásady odvozují (derivují) se nová potřebná slova dle zvláštních logických pravidel, sestavených dle analogie řečí přirozených. Logika a žádoucí přesnost umělé řeči velí též, aby pro každý pojem bylo jen jedno slovo, ale i aby pro každý pojem bylo jiné slovo. A tu jsou někdy obě uvedené zásady v rozporu. Jak tento rozpor odstraniti, jak zabrániti tomu, aby snad v budoucnosti nevznikaly dialekty esperanta, aby totéž slovo nemělo dvou významů neb aby pro týž pojem nebyla dvě slova, krátce jak pečovati o rozvoj esperanta po stránce jazykové, ta otázka zaměstnávala esperantisty hned cd počátku hnutí. Časopis »Esperantisto«, který vycházel od r. 1889, tedy hned od začátku hnutí, v Norimberce, byl pln rozmanitých návrhů a podnětů v tom směru. Prvé desetiletí řeči přineslo také už prvé návrhy na rozsáhlé reformy gramatických i slovníkových pravidel. Návrhy ty získaly i poměrně dosti stoupenců (byl jejich přívržencem i nynější slavný esper. spisovatel Grabowski), byly konečně podrobeny hlasování tehdejších esperantistů a tu většinou odmítnuty. Po té věnovali se reformisté propagaci esperanta v původní jeho formě. Roku 1898 začala mezinárodní kampaň pro rozšíření esperanta a znamenité výsledky té práce vidíme dnes.

Jednoty v nazírání na možnost a způsob vývoje ovšem nedocíleno ani po tom. Je to přirozeno. Neníť žádné analogie v dějinách vzdělanosti, dle níž mohlo by se soudit na vývoj umělého jazyka a sociologie je ještě věda příliš mladá, než aby mohla vypočísti nebo jen předpověděti výsledek sociologických pokusův. Lze tedy souditi o naznačených otázkách toliko dle analogií vzdálenějších; a soudy takové jsou ovšem jen pravdě podobné. To ovšem má za následek nejen rozmanitost úsudků a názorů, ale i neústupnost a fanatismus zastánců některých názorů a hesel. Rozmanitost úsudků věci prospívá, neústupnost a fanatism škodí. (Pokrač.)

LA EVOLUCIO DE TOLSTOJ.

Boheme verkis *PhDr. Frant. Krejčí*, profesoro de la filozofio en la bohema universitato de Praha. El la manuskripto de l' aŭtoro tradukis *H. K. Bouška*.*)

Tolstoj mortis . . . La tuta civilizita mondo direktas la rigardon al Jasnaja Polnaja, kie sen ĉia ekstera pompo vilaĝanoj (muĵikoj) kaj studentoj enterigis en naturan tumulon de arbara monteto la kadavron de sia granda instruanto kaj bonfaranto.

Granda Tolstoj! — Ni sentas en tiu ĉi momento la bezonon montri nian respekton al lia memoro. Ne tiamaniere, ke ni ŝutante cindron sur niajn kapojn antaŭ la majesto de la morto funebru pri la perdo kaj dediĉu nin al la dolorplenaj sentoj. Rilate la grandecon de Tolstoj eksilentas tiuj ĉi senfortaj ĝemoj, la morto perdas sian pikecon. Ni volas kliniĝi antaŭ tiu ĉi grandeco, levi nin pere de ĝi kaj manifesti por la ideoj, kies simbolo fariĝis por la estonta tempo la glora nomo de Tolstoj. — — —

Kiu volas akiri plene la konscion pri la signifo de Tolstoj, tiu devas rigardi la tutan individuon, la tutan vivon, ĉian kreadon kaj ĉian penadon ĉu publikajn ĉu privatajn, kiel organikan tuton, en kiu ĉiuj komponentoj kuniĝas en unu rezultanton kaj ĉiuj estis necesaj por devenigi potencan indivuduecon kaj estas egale gravaj por povi kompreni ĝin. Nenion el tio, kion li kreis kaj pri kio li penis, oni devas preterrigardi taksante lian laboron, ĉio kondiĉas lian grandecon kaj klarigas lian influon. Krom »Milito kaj paco«, »Anna Karenina«, »La sonato de Kreutzer« egale valoras en tiu ĉi rilato »La konfeso«, »Klarigoj de l' evangelioj«, legolibroj por la infanoj, eĉ tiu muĵika ĉemizo kaj muĵikaj botoj, kiujn oni vidas sur portretoj de Tolstoj, estas esenca apartenaĵo por plenigo de lia individueco. La romanoj »Milito kaj paco«, »Anna Karenina« kondiĉas lian gloron de poeto, liaj broŝuroj kaj popularaj religiaj verketoj kondiĉas lian signifon por sociala evolucio de mizerigata Rusujo kaj tiu vilaĝana ĉemizo klarigas la preskaŭ piecplenan estimon, kun kiu amis lin la plej suba, sed samtempe la plej multenombra klaso de la rusa nacio, tiuj muĵikoj, kerno de la rusa popolo de kies konsciiĝo kaj leviĝo dependas la estonteco ne sole de Rusujo, sed eĉ de la cetera Eŭropo. Nur ĉio ĉi kune prezentos al ni Tolstoj'on, kiun admiras kaj kies parolojn atentplene aŭskultis la tuta mondo.

---

*) Vidu ankaŭ: *Signifo de L. N. Tolstoj* (prof. dr. Frant. Krejčí—Jos. Holub) en »Boh. esp.« III. (pĝ. 3, 24). *La red.*

Estas multaj, kiuj ŝatas en Tolstoj sole la poeton kaj kiuj lian postan agadon popular-klerigantan kaj religi-purigantan rigardas kiel la dekadencon de potenca spirito, kion ili diversmaniere klarigas. Estas aliaj, kiuj plej alte ŝatas lian agadon soci-reformantan kaj Tolstoj mem rigardas sian artistan agadon kiel eraron, kiun li kondamnas per akraj vortoj. Kaj aliaj ŝatante ĉi ambaŭ estas ofendataj per tiu muĵika ĉimezo, per tiu penado vivi laŭ la principoj predikataj al la aliaj, ili vidas en tio vantoplenan deziron fari sin interesplena, trajton de la mezepoka romantismo aŭ ili rigardas lin kiel religi-mistikan fantaziulon, kiun sole la forta korpa konstituo savis de la lasta stacio, en kiu finiĝis la vivo ekzemple de Nietzsche aŭ de Comte. Iu Möbius verkus la libron: Das Pathologische an Tolstoj (Patologiaĵo ĉe Tolstoj) Kaj la plej saĝaj kaj prudentaj esprimas sian tutan indignon pri, kiel ili diras, ekstremaĵoj de Tolstoj per la vorto utopismo, per kiu ili kondamnas lian ideon pri la mondo, liajn moralon kaj religion, asertante samtempe, ke ili defendas lian gloron de poeto kontraŭ li mem.

Sed oni devas alimaniere rigardi al Tolstoj, por konatiĝi pri lia grandeco. Oni devas neniun flankon de liaj vivo kaj kreado ellasi aŭ malŝati. Kiu tiele faras, tiu vidas Tolstoj'on malgrandigitan per la rigardangulo de sia vidmaniero, li ne atingos la meritatan ŝaton. La vivo de Tolstoj, la evolucio de tiu ĉi potenca individualeco iris seninterrompe de la komenco ĝis la fino laŭ la supreniranta linio kaj kion oni vidas sur ĝia fino, tio estas kulminaĵo de ĉio, kio en li kuniĝis el la efikantaj fortoj kosmaj kaj sociaj per feliĉa kombino al la individua vivo. Tio ĉi estas celo, por kiu li vivis kaj kreis, por kiu li venis en la mondon, la celo, al kiu ĉio antaŭa estas rimedo kaj laŭ kiu oni devas taksi la valoron de la vivo de Tolstoj por la vivo de la tuto, por la homaro, ĉar en lia evolucio, kiun oni povas detale postsekvi laŭ liaj propraj priskriboj, oni rimarkas la leĝon de suprenirado, sed ne de malsuprenirado, kiel ajn oni tion juĝas.

La tiel nomata subita ŝanĝo, per kiu Tolstoj montrinte la malŝaton pri la arto transiris al la predikado de renaskiganta instruo kaj al la moral-kleriganta laboro, tiu ĉi ŝanĝo, kiu kaŭzis multan indignon en la sferoj de kritikistoj kaj estetikistoj, suprizas sole tiun, kiu ne atentis la organikan seninterrompecon de la evolucio de Tolstoj. Tiu ĉi ŝanĝo okazis en la zenito, supro de la kreanta energio artista, en la aĝo de maturiĝinta dumviva sperto, en la pleniĝo de

la vira forto kaj en la klara konscio, en la plena sano! Neniu el la kondiĉoj, per kiu oni klarigas la homajn farojn, atestas tie ĉi ian malfortiĝon, dekadencon. Tolstoj vivis kaj laboris ankoraŭ dudek jarojn, lia kreanta poeta kapableco ne malaperis, kiel atestas brilaj partoj de la romano »Reviviĝo«, senkonkurencaj plastikaj skizoj »Sinjoro kaj servisto« kaj la ĉarmaj popolaj rakontoj. Kaj ĉu eble la problemoj, al kiuj li poste turnis sin kun la tuta forto de sia potenca intelekto, estas ne indaj je homo, ĉu la aliaj eminentaj homoj ne pasigis la tutan vivon per la penado solvi ilin kaj ĉu ili ne fariĝis ĝuste pro tio famaj? Esti moralisto, pedagogo, reformanto certe per si mem ne estas simptono de malfortiĝanta aŭ malforta spirito kaj la solvado de problemoj socia, religia kaj nacia estas neceso de la vivo por ĉiuj ĉu grandaj ĉu malgrandaj.

Kaj tiamaniere denove restus sole tiu muĵika ĉemizo kiel simbolo de strangemo, ĉar la strangemo estas signo, se ne de abnormaleco, do ĉiam de io, kio povas senvalorigi eĉ la plejan grandecon. Kiom oni tion riproĉadas al li kaj kiom oni serĉas pri tio alprenante en sferon de komikeco ĉiajn nekonsekvencaĵoj, kiujn Tolstoj faris penante efektivigi ĉe si mem la konsekvencojn de siaj etikaj principoj! En la principo, en la peno per sia propra vivo efektivigi la moralajn principojn certe estas nenio komika nek stranga,... oni povus pri tio diskuti, sed mi mallonge diras: Tiu muĵika ĉemizo de Tolstoj meritas fariĝi sankta relikvio, kiu al la venontaj epokoj rememorigadus la devojn, kiujn havas la inteligentuloj kaj riĉuloj al la malriĉaj kaj nezorgitaj sferoj, per kies laboro kaj mizero estas kondiĉita ilia relativa bonstato.

Sekve estas nenio, kio trudus al ni en la tiel nomata ŝanĝo aŭ renverso en la evolucio de Tolstoj vidi dekadencon. Sekve ankaŭ la evolucio de Tolstoj ne kulminis en lia poeta kreado, sed en tio, kion oni vidas sur la fino de tiu supreniranta linio, laŭ kiu iris lia evolucio. Tiam mi diras: Plej alte staras Tolstoj kiel heroldo aŭ se oni deziras kiel apostolo de la humaneco, de la principo pri la egaleco, libereco kaj frateco inter ĉiuj homoj senescepte.

La poeta gloro estas piedestalo, de sur kiu li estas rajtigita paroli al la tuta mondo; la gloro de poeto donas al liaj paroloj gravecon kaj estas potenca, neanstataŭebla rimedo en la batalo, kiun li entreprenis por la idealo pri la morala altigo de la homaro. Per la poeta kreado Tolstoj

fariĝis granda, kaj per la batalo por la morala idealo li elkreskis ankoraŭ pli supren. Kaj lia tuta grandeco estas brilanta stelo de la konsolo por tiuj, kiuj en efektivigo de la idealo de la humaneco vidas la savon en la nuna anarĥio de la socio. Per tio ĉi Tolstoj fariĝis la plej granda bonfaranto de la nuna homaro.

LA ESENCO KAJ EVOLUCIO DE LA HUMANECA IDEO.

La I. ĉapitro (Enkonduko) de la verko *»Ideály humanitní«* (Idealoj de la humaneco, 1901) de prof. dr. *T. G. Masaryk*. Kun la permeso de l'aŭtoro el la bohema lingvo tradukis *H. K. Bouška*.

La moderna homo havas sorĉan devizon »humaneco« — »homeco« — »homaro« — per kiu ĝi komprenigas ĉiujn siajn dezirojn preskaŭ tiel, kiel la homo en mezepoko resume esprimadis ĉiujn siajn sentojn kaj penojn per la vorto Kristano. Tiu ĉi humaneca ideo, homeco, estas la fundamento de ĉiuj nuntempaj aspiroj kaj klopodoj, precipe ankaŭ nacionalaj, kiel oni scias jam el la diro de Kollár: »Se vi vokas Slavo, ĉiam resonu al vi homo.«

Komencante de la renesanco kaj reformacio naskiĝas tiu ĉi nova etika kaj sociala idealo apude de la kristana; ĉi tiu idealo baldaŭ fariĝas kontraŭkristana kaj superkristana: la homo — humaneca ideo, humanitismo.

Ĉi tiu idealo disvolviĝas iom post iom. Per la reformacio parte liberiĝas la racio (prudento), naskiĝas la moralo senasketisma, devenas ŝparemo kaj laboremo; samtempe sekve la disvastiĝon de la legoscio kaj de la legado en Sankta Skribo oni transprenas la malnovatestamentan energion. Krom tio al la renesanco kaj reformacio taŭgas la transprenado de klasikaj idealoj pri la vivo, precipe de la romaj politikaj virtoj kaj artisma opiniaro pri la mondo kaj vivo. Plue evolucias la scienco kaj nova filozofio, liberiganta la racion plene de la domita eklezia aŭtoritato. La grandan praktikan signifon en la nova tempo havas la ŝtato, komence la absolutisma; ĝi regatigas al si la eklezion t. e. ĝi donas al la politikaj virtoj la saman, ofte la pli grandan valoron ol al la ekleziaj; la roma rajto kaj ĝiaj principoj fariĝas esenca parto de la modernaj principoj kaj de la moderna socia organizo. La novatempa ŝtato dum la daŭro de la tempo fariĝis pli kaj pli demokratia kaj popola, kaj tiu ĉi pli popola ŝtato proklamas en la XVIII. jarcento la homajn

kaj individuajn rajtojn (La amerika kaj franca revolucioj). El tiuj ĉi homaj rajtoj naskiĝas poste la naciaj kaj lingvaj rajtoj, la socialaj kaj ekonomiaj rajtoj (ekz. la rajtoj je laboro, je minimumo por ekzisto k. t. s.) kaj fine jam kodiĝas la virinaj kaj infanaj rajtoj (moderna familia rajto).

Tiel disvolviĝas la ideo de humaneco kaj korpiĝas en la moderna socia vivo.

La esenco de tiu ĉi nova humaneca idealo montriĝas ankaŭ en tio, ke oni rigardas ĝin kiel naturan. Oni serĉas la fundamentojn de la naturaj religio kaj teologio, de la naturaj rajto kaj moralo, de la natura (origina) stato de la socio, ŝtato, kaj fine la filozofio havas kiel bazon la naturan (»sanan«, »komunan«) racion kaj la arto, ĉiam pli konsciplene serĉas la naturon. La idealo de la humaneco estas unuvorte, la natura, nova idealo kontraŭ la historie donita, malnova. (Fino.)

DEVENO DE LA MAIZO.

Rakontas *Fr. Vl. Lorenz.*

Ĉe Indianoj guaraniaj de Sudameriko oni renkontas jenan legendon:

En la tempoj, kiuj sin perdas en la nokto de la antikveco, vivis la Indianoj tre malproksime unuj de l' aliaj, kaj estis necese, ke ĉiu familio zorgu pri si mem, serĉante la nutraĵon per la ĉaso aŭ per la fiŝkaptado.

Du ĉasistoj tamen vivis kune, kaj estis la solaj, kiuj helpadis unu la alian en la laboroj, dividante inter si kaj siaj familioj ĉion, kion ili akiris. Unu tagon, kiam ili eliris fiŝkapti, diris unu el ili, kies nomo estis Avati:

»Ĉu ne estus eble, ke Njandejara, la Granda Spirito, kiu sendas al ni la birdojn de la ĉielo kaj la bestojn de la tero por nutraĵo nia kaj de niaj gefiloj, bonvolu doni al la homaro alian specon de nutraĵo, pli facilan por kolekti? La sovaĝaj fruktoj daŭras malmulte, la ĉasaĵo kaj la fiŝoj ofte mankas al ni, kaj ni fartus tre malbone, se ni ne havus la radikojn de iuj plantoj kaj la burĝonojn de l' palmujo por manĝi.«

En tia interparolado pasis la horoj; la fiŝkapto ne estis sufiĉanta en tiu ĉi okazo. En la sekvanta tago frue ili preparis iliajn arkojn kaj sagojn kaj iris en la arbaron ĉasi, sed egale kun malgranda rezultato: la birdoj kaj la kvarpieduloj

estis foririntaj en alian regionon, kaj la ambaŭ amikoj apenaŭ ricevis la kvanton necesegan. Dum la tuta monato la manko estis sentata.

En iu vespero interparoladis Avati kun sia amiko, sidante ambaŭ sur trunko, kiu servis al ili kiel benko, proksime de la pordo, kiam aperis al ili brava militisto, kiu eliris el la mallumo, tuta envolvita en lumradioj. Li alpaŝis al ili kaj diris: »Mi estas sendito de Njandejara, kiu aŭdis viajn plendojn kaj sendis min por zorgi pri la nutraĵo, kiu mankas al vi. Mi devas batali kun vi ambaŭ, por vidi, kiu estas la pli malforta; tiu-ĉi devos oferi sin kaj esti enterigita proksime je la domaĉo. El la enterigejo elkreskos planto utila al la homoj kaj donos fruktojn, bonegajn kaj sufiĉantajn por nutri ĉiutempe viajn du familiojn kaj ĉiujn, kiuj ĝin plantos.«

Tuj komencis la batalo. La pli malforta estis Avati. Li estis mortigita de la sendito de la Granda Spirito. La vivorestinta amiko enterigis lin, plorante pro la neevitebla disiĝo; kaj la militisto malaperis en la ombro, el kiu li estis veninta.

La ĉasisto devis labori multe kaj longatempe resti en la arbaroj kaj sur la kampoj, por kolekti la nutraĵon necesan por sia familio kaj por tiu de la mortinta amiko. En unu de la unuaj tagoj de la printempo oni estis surprizata per agrabla sciigo, ke sur la enterigejo de Avati estis kreskinta bela planto de grandaj verdaj folioj kaj orsimilaj spikoj. Tiam la ĉasisto vidis, ke efektiviĝis la promeso, farita de la batalinto, kaj trankviliĝante li komprenis la grandan saĝecon de Njandejara, kiu faras, ke la ofero de bona homo fariĝas fonto de bono por ĉiuj. De tiam la guaranioj nomis tiun planton »avati« (t. e. maizo), je la memoro de l' oferita Indiano, kaj plantis zorge en siaj malgrandaj plantejoj la belajn grajnojn, de kiuj la spiko, transirante el mano al mano, simboligas la unuiĝon kaj sinceran amikecon. Neniu bona Indiano forgesas, ke la sufiĉegeco, kiun donas tiu mirinda nutraĵo al la homoj kaj al siaj bestoj, devenas de la ofero de fidela amiko.

RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Kultura signifo de la komerco (El la raporto »La organizo de la komerco per esperanto« prezentita al la I. kongreso de UEA). La plej granda parto de nia kulturo estas ŝuldata al la komerca agado de la homaro. La bonstato de la homoj estas bazita lastvice sur la komerco. La komercisto alportas la produktaĵojn de la metiisto, de la fabrikisto

al la konsumanto, tiamaniere egaligante senvaloran superfluon ĉe unu kaj premegantan mankon ĉe la alia. La mizeron de la malsato la komerca agado igas preskaŭ nekonata en la landoj aliĝantaj al la internacia trafiko. — La komerco aliformigas naturproduktaĵojn en kapitalon, laboron en panon; ĝi nutrigas milionojn da homoj, ĝi kreas riĉaĵojn, ĝ fruktoportigas la homan spiriton, la inventemon (eltrovemon), ĝi vekas la emon al belaj artoj kaj kreas novajn bezonojn. — Instigante preskaŭ ĉiujn kampojn de spirita faro, la komerco plibonigas la instruadon, apogas la sciencojn. Ĝi pliakrigas la pensadon, plimultigas la kapablojn de l' cerboj. — Ĉar la komerco bezonas pli rapidan kaj certan interŝanĝon de la necesaĵoj, ĝi estas kreanto de bonaj vojoj, de fervojoj tranĉantaj vastajn landojn kaj ŝtonegajn montarojn kaj konstruiganto de ŝipkolosoj rapidsulkigantaj la ondojn de l' oceanoj. Ĝi scias venki obstine ĉiujn naturajn barojn. — La komerco ne povas limigi sin al la anoj de unu lando. La diverseco en la produktkapableco de la terpartoj kaj la divido de la laboro kaŭzas, ke la bezonoj de unu popolo ne povas esti kontentigataj en la lando mem. La komercisto devas alporti nutraĵojn kaj vestoŝtofojn el ĉiuj partoj de la mondo. Aliflanke li serĉas aĉetantojn por la produktaĵoj de la hejma industrio en ĉiuj ĉefaj landoj. Tiel la komerco transsaltas ĉiujn limojn politikajn. Ĝi alproksimigas la naciojn, ĝi diskonigas la kulturaĵojn de unu lando al la aliaj, ĝi interligas amike la naciojn, ĝi donas al ili komunajn interesojn. — Do ĝi vekas en la popoloj la senton kaj konscion, ke sole amika konsento kaj paca kunlaboro povas progresigi la bonstaton de la homaro, ĝi firmigas la penson pri la unueco de la homaro. — Neniu povas kontraŭdiri la fakton, ke la komerco estas ĉefa kreanto kaj portanto de la kulturo. Ĝi estas ilo, kiu kondukos la homaron al la plej granda perfekteco. *W. A. Vogler* (Hamburk).

La societo de Blanka kruco, batalanta por la pureco de la seksa vivo inter la junaj viroj, havas 3812 membrojn en 342 lokaj filioj (311 en Germanujo, 17 en Svisio, 14 en aliaj landoj). La centro de la societo estas en Berlin. *Hkb.*

PROBLEMOJ KAJ OPINIOJ.

Aŭtokritiko de Uniestroj. Oni diras, ke konatiĝi pri siaj eraroj kaj mankoj estas la unua grava paŝo por la boniĝo. Se estas vere, tiam la ĉefuloj de »Bohema unio esperantista« baldaŭ fariĝos bonaj homoj kaj bonaj esperantistoj, ĉar ili jam kuraĝis konfesi publike, en sia II. kongreso, siajn pekojn. Mi almenaŭ kredas, ke ili pensis pri si mem dirinte tiujn ĉi parolojn: »Oni ne malaltigu la intencojn de alia. Ni ne malhelpu unu la alian. Ni ankaŭ respektu la karakteron de la alia, se li havas bonan karakteron, ĉar li eble troviĝas en aliaj vivkondiĉoj kaj pro tio li devas iri alian vojon«. »Plue ankaŭ ne estas esperantisma-frata agado, se frakcio ne apartenanta al centro provas gajni por si la klubojn de la centro per flugiloj (ankaŭ per buŝa parolo, kiel ekz. iu redaktoro faris en Liboc. Rim. de la red.). Aŭ se iu sub preteksto de esperantismo ellogas monon de alia« (ĉu okazis io simila? mi ne povas kredi. Rim de la raportinto). » . . . estas necese, ke la malpli kleraj serĉu okazojn por pli profundigi sian kleron. Sed honesteco kaj justeco estas nepre necesaj. Mi estas konvinkita (ni ankaŭ. La red.), ke dum tempo oni forigos el ĉiuj societoj esperantistaj homojn nehonestajn, kiuj entrudas sin eble sub preteksto de esperanto por serĉi nehonestan profiton aŭ havas karakteron malbonan. La ellernado de esperanto ne estas bedaŭrinde ilo por nobligi karateron, se ĝi estas malnobla, kaj la esperantisma lernejo ne estas instituto morala; sed kontraŭe

la celado disvastigi esperanton ne devas servi kiel preteksto por entrudi sin en societon de honestaj, sinceraj homoj. Ni devas paciĝi kun la fakto, ke tiaj homoj profituzas ĉion bonan, do ankaŭ esperanton. Se ni estas konvinkitaj, ke ni devas eviti iun personon pro ĝia malbona karaktero, ni devas klopodi pri forigo de tia persono el niaj vicoj, kie brila frazo pri esperantismo povus malfermi al ĝi vojon en societon, kiun ili ne indas.« »Tiu ĵaluzo malutilas pli ol ĝi utilas al nia komuna afero. Ĉiu ne povas esti gvidanto kaj kontraŭe, simpla agema batalanto, membro de klubo (nemembro ne? La red.), povas utili pli ol estro, kiu malageme sidas sur sia trono«. »Estus dezirinde, ke tiu trista (ho, dio, de kiam »Čas. čes. esp.« idiĝas? trifoje sur unu paĝo mi legas la idan vorton »trista«, kvankam la fundamentistoj ĉiam diras »malĝoja«. La rap.) fakto plej baldaŭ malaperu en la mondo kune kun la malbenita nacia kaj religia malamoj.« Tre ĝustan kaj bone trafantan aŭtoportreton prezentis en la kongreso la ĉefuloj al la regata popolo (ni devas kredi, ke ili parolis pri si, ĉar ili ne nomis iun alian) — ni atendu nun, ĉu venos la konsekvenco: pliboniĝo. Tiam estos vere tre facila konkordo kaj kunlaboro. *Nemo.*

KRONIKA A KOMENTÁŘ.

Universitní kollegium o jazycích umělých. Na berlínské universitě koná prof. dr. Ad. Schmidt — který je čestným členem svazu něm. esp. — čtení »Geschichte und Theorie künstlicher Verständigungsmittel« (Dějiny a theorie umělých prostředků dorozumívacích). Přednášky zahájené 7. list. 1910 konají se v pondělí od 6. do 7. hod. v posluchárně čís. 23. U nás by se ovšem žádný universitní profesor nebo docent »nesnížil« k takovým přednáškám . . . *Hkb.*

Hygienická výstava v Drážďanech a esperantisté. Od měsíce května do října r. 1911. bude v Drážďanech uspořádána obrovská mezinárodní výstava hygienická, k níž již nyní dějí se rozsáhlé přípravy ve všech zemích. Na této výstavě bude zřízena zvláštní přijímací kancelář pro esperantisty, kde každý esperantista, který navštíví Drážďany, obdrží veškerá potřebná vysvětlení o městě i výstavě. Kromě toho každému esperantskému návštěvníkovi budou k službám policisté (počtem 40) a kondukteři tramwaye (30), kteří znají esperanto. Výbor spolku »Societo Esperanto« rozhodl se uspořádati ve dnech 16.—18. srpna r. 1911. (to jest těsně před mezinárodním sjezdem esp. v Antverpách) schůzky cizích i domácích esperantistů. Jednotlivci i společné výpravy esp. (zejména jedoucí do Antverp) budou vřele přijati. Proto, kdo pojede do Drážďan nebo jen Drážďany, vyhledej kancelář esp. na výstavišti. *Kamilla Fürth.*

